

Aliĝilo

Pliaj aliĝdatoj

Mi estas ordinara membro de Germana Esperanto-Asocio (GEA)

Atentu: Se vi loĝas en Germanio kaj NE estas ordinara GEA-membro, vi krompagas 30€.

Mi partoprenos

tuttempe

parttempe de _____ ĝis _____

Mi volas manĝi vegetare vegane

Mi preferas dulitan unulitan ĉambron*

Mia nomo aperu en la reta listo de aliĝintoj

Mi antaŭpagos 50€ per

IBAN-ĝirado UEA-Konto

ĝis plej malfrue la _____-an de _____ 2021

* mi krompagas 23,33€ tage

Deutscher Esperanto-Bund e.V.
Esperanto-Laden
Katzbachstraße 25
10965 Berlin

Faksilo: +49 30 4193 5413

Kotizo kaj organizantoj

	ĝis 2021-08-27	ĝis 2021-10-31	poste*
kotizo	440€	460€	490€

* necesa antaŭpago por validigi la aliĝon: 50€

Kotizadaptiĝo: La higiena preparado de la domo kaŭzas aldonajn kostojn. Por tiujn kovri ni devis adapti la kotizojn.

La **kotizo** inkluzivas la restadon de la 28-a de decembro 2021 vespere ĝis la 3-a de januaro 2022 matene: loĝado en dulita ĉambro, tri manĝoj tage, trinkaĵoj (minerala akvo kaj pomsuko ĉiutage), programo, silvestra bufedo kaj diversaj alkoholaĵaj kaj ne-alkoholaĵaj trinkaĵoj dum la silvestra nokto. Krompago por **unulita ĉambro** 140 eŭroj por tuttempaj partoprenantoj / 23,33 eŭroj tage.

La **ekskursoj** estas pagendaj aparte.

Personoj loĝantaj en Germanio, kiuj ne estas ordinara membroj de Germana Esperanto-Asocio, krompagas 30 eŭrojn.

Parttempa partopreno eblas kontraŭ 85 Euroj nokte (inkl. 3 manĝoj kaj programo). Tagaj gastoj pagas 50 eŭrojn tage (inkl. 3 manĝoj kaj programo).

Atentu: Ĉi-jare la LUMINESK' daŭras nur ses noktojn, pro organizaj kialoj flanke de la domo.

Kiu respondecas pri la renkontiĝo?

Kiel en la pasintaj jaroj la ĉefa respondeculo estas Andreas Diemel el Duisburg. Volonte vi povas alparoli lin ĉiam kaj demandi pri detaloj: demandoj@luminesk.de aŭ per fiksreta telefono +49 203 2964 877 (kun alvokrespondilo).

Organiza teamo

Andreas Diemel (ĉeforganizanto)
Barbara Brandenburg (oficejo)
Yoshie kaj Dieter Kleemann (gufujo)

Pago

Aliĝo validas kun antaŭpago de 50 eŭroj
al jena konto de Germana Esperanto-Asocio:
IBAN: DE53 5085 1952 0040 1158 42
(Sparkasse Odenwaldkreis)

BIC: HELADEF1ERB

al aŭ per UEA-Konto geaa-n.

Pagcelo: Luminesk' 2021 Münster + via nomo

Bonvolu ĝiri la restsumon ĝustatempe antaŭ la komenco de la aranĝo.




© Deutscher Esperanto-Bund e.V. 2021

Bildo de
KarInKarIn
sur Pixabay

Kio estas LUMINESK'?

LUMINESK' estas la silvestra renkontiĝo de Germana Esperanto-Asocio. Ĝi nun okazos la sesan fojon kaj fariĝis posteulo de la iamaj „Internaciaj Festivaloj“ private organizitaj. Ankaŭ ĉi-foje ĝi ofertas varian kaj atkvalitan programon – lingvokurson, prelegojn kaj diskutgrupojn, ekskursojn kaj distrajn programerojn. Partoprenantoj kutime venas el 7 ĝis 8 landoj.



ĉiuj fotoj © Jugendgästehaus Aasee

Kie estos tiu renkontiĝo?

En la historigrava urbo de la tielnomata „vestfalia paco“ la tridekjara milito estis finita en la jaro 1648. Tiutempe la riĉaj komercaj familioj influis la bildon de la urbo, hodiaŭ ankorau videbla per la multaj pompaj domoj ĉirkaŭ la merkata placo Prinzpalmarkt. En la nuna jarcento Münster estas konata pro sia universitato kaj la universitata hospitalo. La miloj da studentoj pozitive influas la urbocentron. Münster (poŝtkodo 48151) estas atingebla per aŭtoŝoseo kaj pli favore per la IC de Kolonjo aŭ Hamburgo. Ĝi situas en bela pejzaĝo de la ebena Münsterland. La arkoiro ĉe la merkato Prinzpalmarkt estas vidinda, same la katedralo Dom kaj la urbodomo, kie la „vestfalia paco“ estis siglita. La multaj studentoj ankaŭ troviĝas sur la vojo de la urba muro, kiu konektas la diversajn urbopartojn ringforme, kompreneble per biciklo, en loka dialekto „leze“.

La domo

LUMINESK'-kunvenejo estos la junulara domo de Münster, kiu situas apud la lago Aasee meze en la urbo. La domo estas moderna, ĵus plia konstruaĵo estis aldonita. Necesejo kaj duŝo situas en la ĉambro. La nuna domo estis konstruita en la jaro 1992. La malnova junulargastejo situanta sufiĉe apude havas faman historion en la Esperanto-mondo: Tiun studentan domon ĉe Aasee ni malgraŭ antaŭmendo por la IJK en la jaro 1974 ne povis ricevi, ĉar oni ĝin ne ĝustatempe sukcesis finkonstrui. Nur dank al la engaĝiĝo de la organizantoj IJK tamen povis okazi, ili trovis aliajn tranoktlokojn.

Jen mi aliĝas al la 7-a LUMINESK'!

Persona nomo:

Familia nomo:

Adreso/Strato:

Adreso/Poŝtkodo, Urbo:

Loĝlando:

Naskiĝdato (tt.mm.jjjj):

Retpoŝtadreso:

Telefono fiksa:

Poŝtelefono:

Dato/Subskribo:

Mi volas partopreni kiel taga gastulo (sen tranokto)

Programskemo

tempo/tago	28-12 (mar)	29-12 (mer)	30-12 (ĵaŭ)	31-12 (ven)	01-01 (sab)	02-01 (dim)	03-01 (lun)
07:00–09:15			matenmanĝo				
09:15–10:45		programbloko 1	tuttaga ekskurso	programbloko 5		programbloko 10	adiaŭo
11:00–12:30		programbloko 2		programbloko 6		programbloko 11	
12:30–13:30		tagmanĝo		tagmanĝo			
14:00–15:30		programbloko 3		programbloko 7	novjara promeno	duontaga ekskurso	
15:30–16:00		kafopaŭzo		kafopaŭzo			
16:00–17:30	alveno	programbloko 4	programbloko 8	programbloko 9			
18:00–19:30	vespermanĝo		vespermanĝo	silvestra bufedo		vespermanĝo	
20:00–21:30	interkona vespero		vespera programo			vespera programo	
poste		gufujo/trinkejo		silvestra balo		gufujo/trinkejo	